duoblaĵo

Unua Jaro. - N° 1. Februaro 1914.

# ESPERANTA REVUO
## PRI
# KOMERCO KAJ INDUSTRIO

MONATA GAZETO

Unu numero : **0** Sm. **200**. — Jarabono : **2** Sm.

ESPERANTO · LINGVO INTERNACIA ·

ADMINISTRACIO
7, Bd Rochechouart, PARIS-9e
~~27, Rue de la Chaussée-d'Antin, 27~~
PARIS

## REDAKCIO

Direktoro : S-ro CH. TESSEZ.

Redakcia Sekretario : D-ro FLAMANT, scienca licenciato.

Administra Sekretario : S-ro J. CHAINEY.

Ĉefpublikigisto : S-ro THIERRY.

## KORESPONDANTOJ

Ni estas tre dezirantaj, ke ĉiuj samideanoj, kiuj povas esti niaj korespondantoj, petu de ni la oficojn kaj la profitojn rezervitajn por niaj agentoj.

## AVIZO

Nepresitajn manuskriptojn oni ne resendas.

La Redakcio konservas por si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn. Originalaj verkoj estos prefere presitaj. Rajtoj de represado kaj de tradukado de ĉiuj artikoloj estas rezervitaj.

***

Oni sendu ĉion koncernantan la Redakcion al la jena adreso :

Esperanta Revuo pri Komerco kaj Industrio
~~27, rue de la Chaussée-d'Antin, 27~~
7, Bd Rochechouart, PARIS-9e
Paris (Franclando).

Ni rifuzos la ne aŭ malsufiĉe afrankitajn leterojn.

N-ro 1. Februaro 1914.

# Esperanta Revuo pri KOMERCO KAJ INDUSTRIO

*Esperanta Revuo pri Komerco kaj Industrio sendas al la Esperantistaro siajn plej korajn bondezirojn por la nova jaro 1914.*

La Redakcio.

**Komercistoj ! Esperanto estas necesa por viaj aferoj ! Legu la sekvantan leteron, kiun ni ricevis !**

GEORG REINER
Eisenwaren-Handlung
Berlin-Rummelsburg

—

Berlin, la 9-an de Oktobro 1913.

Tre estimata Samideano,

Legante vian enketon en « Germana Esperantisto », mi tre ĝojas, ke vi intencas eldoni komercan esperantan revuon.

Mi mem jam kelkaj jaroj propagandas inter la komercistaro, kaj ĉiam mi bedaŭris, ke ne ekzistas faka gazeto.

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

En nia vendejo, ni jam tre efike uzis Esperanton kaj ricevis dum tiu ĉi jaro 345 mendojn el 31 diversaj landoj, skribitajn en Esperanto.

..., mi salutas vin

samideane kaj altestime.

Por propagandi nian aferon, ni petas, ke ĉiu samideano, kiu ricevos kaj legos tiun leteron, bonvolu traduki ĝin sube per sia gepatra lingvo.

# AL NIAJ LEGANTOJ

« Esperanta Revuo pri Komerco kaj Industrio », kies unua numero aperas hodiaŭ, petas siajn legantojn, ke ili bonvolu senkulpigi la Direktoron pri lia nerespondo al la multegaj leteroj enhavantaj petojn pri sciigoj.

Ni ne povis respondi al ĉiuj.

Ili trovos en tiu ĉi numero ĉiujn informojn pri nia celo kaj nia organizado.

Ni petas niajn legantojn, kiuj skribos al ni, ke ili bonvolu adresi siajn leterojn al nia Redakcio, 7, Boulevard Rochechouart, en Paris, kaj meti, post nia adreso, la literon, kiu distingas ĉiun el niaj oficoj.

Nia afero estas tre malsimpla, kaj la enskribado de tiu litero plifaciligos nian laboron kaj permesos rapidan respondon al la petoj de la samideanoj.

# DANKOJ !

Ni tre dankas la samideanojn kaj la gazetojn, kiuj bonvolis kaj bonvolos helpi nin pri nia afero.

Ni ne povas citi ĉiujn Esperantistojn, kiuj skribis al ni. Sed ni sendas al ĉiuj niajn plej korajn dankojn !

# NIA CELO

Jam de kelkaj jaroj multaj komercistoj uzas Esperanton por la plej granda disvastigo de sia komerco. Ni ricevis multajn leterojn, enhavantajn certajn ciferojn.

Germana firmo ricevis per Esperanto, dum jaro, 345 mendojn, el 31 diversaj landoj.

Sed multaj komercistoj diris al ni : « Esperanto ne estas ankoraŭ sufiĉe uzita. Nur kelkaj personoj uzas vian lingvon. Do oni ne povas fari per ĝi multajn aferojn ».

Tamen firmo, kiu dank' al Esperanto ricevas jare 345 mendojn, tio estas interesa !

Tial ni pensas, ke granda tutmonda organizado, kiu uzados tute nur Esperanton, profitigos certe nian aferon kaj tiujn, kiuj ĝin uzos.

Kiam, dank' al Esperanta organizado, oni povos komerci kun ĉiuj eksteraj landoj, kaj komerci utile, tiam Esperanto estos la KOMERCA LINGVO.

Por atingi ĝin, ni organizis la diversajn oficojn, kiujn uzas la komercistoj kaj la industriistoj.

# NIA ORGANIZADO

Niaj legantoj trovos, poste, ĉiujn sciigojn pri nia organizado. La uzado de nia organizado estas senpaga por niaj abonantoj.

Ni petas nur, ke ili bonvolu sendi, kun sia peto, unu respondkuponon.

Ni konservas la rajton publikigi en « Esperanta Revuo pri Komerco kaj Industrio » ĉiun informon, kiu povas interesi niajn legantojn.

## *A.* -- Nia monata gazeto.

Ni eldonos ĉiumonate gazeton, en kiu niaj legantoj trovos multajn informojn pri komerco, industrio, eksportado, enportado, komercaj sciigoj, leĝoj, novaj firmoj, ktp.

Ni citos la esperantistajn prezarojn, eldonitajn de ĉiu firmo, kiu sendos al ni dek ekzemplerojn.

Ni malfermis rubrikon : Petoj de prezaroj, kaj dank' al niaj Malkaraj Anoncoj, ĉiu komercisto povas uzi nian gazeton.

Kvin liniojn senpage povas enpresigi niaj abonantoj.

Fine, nia revuo enhavos gravajn artikolojn pri la komercaj aferoj de ĉiu lando, la komerca vivado kaj la plej lastaj elpensaĵoj.

## *B.* -- Niaj anoncoj.

Ni certigas niajn legantojn, ke niaj anoncoj estas ĉiam kontrolitaj. Ĉiam oni povas uzi nian publikaĵon kaj esti certa, ke oni ne estos trompata.

Por atingi tion, ni petas al la komercistoj, kiuj volas anoncigi en nia Revuo, ke ili bonvolu sendi, antaŭe, al ni modelon de la produktaĵoj notitaj je la anonco.

Nature, ni ne petas, ke la industriistoj sendu al ni aŭtomobilon aŭ aerveturilon. Ne certe, sed ni postulas ĉiam seriozajn atestojn de niaj anoncantoj.

Nenia anonco estos malvera aŭ falsa.

Ni sendas afrankite nian tarifon kaj niajn kondiĉojn al ĉiuj petantoj.

## *C.* -- Nia Mendoficejo kaj nia Ekspoziciejo.

Ni organizis ĉe 27, rue de la Chaussée-d'Antin (apud l'Opéra), en Paris, Mendoficejon kaj Ekspoziciejon.

La Esperantistaj komercistoj kaj industriistoj, kiuj deziras ekspozicii siajn vendaĵojn, povas sin turni al nia Redakcio pri detalaj sciigoj.

Almenaŭ 1000 klientoj, neesperantistoj, vizitas semajne

nian oficejon, kaj aĉetas regule la produktaĵojn de neesperantaj komercistoj.

Do niaj samideanoj trovos facile klientaron, se ili bonvolas komisii al ni siajn modelojn kaj siajn prezarojn.

Ni petas nur sumeton por niaj elspezoj. Tiu sumeto estas ŝanĝebla.

## *D.* -- Nia Oficejo de Makleristoj.

Ni organizas la reprezentadon, per Esperanto, por ĉiu firmo, kiu bonvolas sin turni al ni.

Niaj multaj agentoj estas metiaj kaj povas utile uzi siajn rilatojn por komerci la aferojn, kiujn ni konfidas al ili.

Ĉiu agento bone konas la produktaĵojn por kiuj li agas kaj la aĉetemajn klientojn.

Ni ekzamenas, kun niaj agentoj, ĉiun detalan proponon, kaj post nia ekzameno ni diras al la petanto, ĉu ni povas utile reprezenti lian aferon.

Ni havas multajn agentojn, kiuj vizitas la komercistojn kaj aĉetantojn tra Paris kaj Francujo.

Plie, ni propagandas per anoncoj la produktaĵojn pri kiuj la komercistoj aŭ la industriistoj uzas niajn oficojn.

Komercistoj, industriistoj, kiuj volas pligrandigi viajn aferojn, skribu al ni !

## *E.* -- Nia Komerca Esperanta Lernejo.

Ni malfermos baldaŭ Komercan Esperantan Lernejon.

La prezoj de la kursoj estas moderaj (monate 4 Sm.). Ni organizas la kursojn, kies listo sekvas :

Esperanto ;
Reklamo ;
Maklerado ;
Kalkulado ;
Maŝinskribado, k. t. p.

Tial ni edukadas bonajn agentojn, oficistojn kaj makleristojn, kiuj povas utile uzi Esperanton.

Ni havigos oficojn al niaj lernantoj, kaj oficistojn al la esperantaj komercistoj.

La kurso de Esperanto praktika kaj komerca komencis la Merkredon 21-an de Januaro.

## *F.* -- Niaj Komercaj Sciigoj.

Dank' al niaj korespondantoj tra la mondo, ni povas havigi senpage ĉiujn komercajn sciigojn, kiuj estas petataj al ni ; ekzemple adresoj de komercistoj, novaj firmoj, k. t. p.

Ni donos ĉiujn sciigojn senpage al niaj abonantoj ; sed ni petas, ke ili bonvolu sendi al ni tri respondkuponojn por niaj poŝtelspezoj.

Ni sendos tiujn sciigojn letere ; sed ni konservas por ni la rajton publikigi en « Esperanta Revuo pri Komerco kaj Industrio » ĉiun sciigon, kiu povas esti utila al niaj legantoj.

## *G.* -- Senpagaj Esperantaj Organizaĵoj.

Ni organizas, ĉie kaj senpage, esperantan oficon ĉe ĉiuj komercistoj, kiuj bonvolos sin turni al ni.

Dank' al niaj aliaj oficoj (presejo, mendoficejo, k.t.p.) ni estas certaj, ke la organizado de esperanta ofico povas pligrandigi la aferojn.

## *H.* -- Nia Tradukoficejo.

Ni tradukas ian ajn tekston.

Ni petas nur, ke oni bonvolu sendi kune tri respondkuponojn po unu paĝo.

*I.* -- Nia speciala Presejo.

Ni havas specialan presiston, kiu povas entrepreni ĉian laboron (cirkulerojn, katalogojn, artpresaĵojn, librojn, poŝtkartojn, k. t. p.). La prezoj estas moderaj.

Ni povas ankaŭ fari, per skribmaŝino, cirkulerojn.

Plie, ni sendas, afrankite, por la eldonprezo, ĉian libron, ĉian revuon, esperantan aŭ ne.

# Alvoko al Esperantistoj

Esperantistoj !

Per nia afero ni volas pruvi la utilecon de Esperanto.

Nia afero estos malgranda mondo, en kiu oni uzas nian lingvon por la eksterlandaj rilatoj.

Se ni sukcesas (kaj ni faros ĉion por tio), certe ĉiuj komercistoj uzos Esperanton.

Ni petas do ĉiun samideanon, ke li bonovolu diri al unu el komercistaj amikoj : « Uzu Esperanton, kaj skribu al "Esperanta Revuo" ; uzu ĝiajn oficojn ».

Ni petas, ke oni bonvolu doni al ni la adresojn de la komercistoj, kiuj uzus Esperanton, se Esperanto pligrandigus ilian komercon.

Ni petas, ke oni bonvolu precipe sendi al ni la adresojn de la komercistoj, kiuj komercas kun eksteraj landoj.

# Alvoko al Grupoj

La unua numero de nia Revuo estas sendata senpage al ĉiuj Prezidantoj aŭ Sekretarioj de la Esperantistaj Grupoj. Ni petas ilin, ke ili bonvolu atesti ricevon al ni de tiu numero. Kaj same, ke ili bonvolu sendi al ni la liston de la anoj de sia Grupo.

Se vi scias, ke ia Grupo ne ricevis tiun ekzempleron, bonvolu sendi al ni ĝian nomon kaj adreson.

La Grupoj, kiuj deziras ĝin aboni, bonvolu sendi nur dek respondkuponojn.

## Komerca Movado

1. — Ni tute speciale rekomendas, al ĉiuj niaj legantoj la burgundan Ŝaŭmvinon « *Esperantio* » de nia samideano Gaston Charcousset. Tuj postulu la esperantan prezaron al lia agento : J. Pion-Muller, V.-D. de U.E.A., 21, rue de Lorraine, en Beaune (Côte-d'Or), kaj, poste... sendu al li mendon. Aŭ pli bone : sendu tuj 50 frankojn (20 Sm.) kaj vi ricevos, *afrankite* en Francujo, kaj ĝis landlimo de Fremdlando, keston da 15 boteloj diverskvalitaj.

2. — La Kompanio de Orléans eldonis luksan broŝuron en Esperanto : « Turismo ĉe la Fervojaro de Paris-Orléans kaj Midi ». Tiu broŝuro estas sendata *senpage* kaj *afrankite* post peto al Fervoja Kompanio de Orléans (Bureau du Trafic-Voyageurs-Publicité), 1, place Valhubert, Paris. — Ĉiuj gesamideanoj petu ĝin !

3. — La mondkonata firmo *Heintze kaj Blanckertz*, Berlin, N. O. 43, fabrikado de skribilplumoj kaj skribilaroj, eldonis artepresitan kaj interesan broŝuron en Esperanto pri skribilplumoj depost praavaj tempoj ĝis hodiaŭ. Petu senkostan alsendon !

4. — Carmol-Fabrik, Rheinsberg (Germanujo), fame konata pro la fabrikado de la kuracilo « *Carmol* » eldonis esperantan prospekton kaj sendas ĝin senkoste al ĉiuj.

## Proponoj de Oficoj

1. — Oni petas korespondanton en ĉiu urbo tra la mondo. Petu sciigojn al la Redakcio de E. R. K. I. n° 1.

2. — Makleristoj. — Oni petas (krom en Franclando, Belgujo, Svisujo, Italujo, Germanujo, Egiptujo) makleristojn por viziti spicistojn kaj industriistojn. E. R. K. I. n° 2.

3. — La firmo « *Fortier-Picard* » en Beaune (Francujo) petas makleristojn aŭ agentojn tra la mondo.

4. — Oni petas ĉie tra la mondo makleristojn por vendi bonan produkton al la orumistoj kaj la arĝentumistoj. Sin turni al la Redakcio, n° 4.

5. — Granda profito por la samideanoj, kiuj havigas esperantajn presaĵojn. Sin turni al la Redakcio, n° 5.

6. — Monopolan reprezentadon oni povas havi en ĉiu urbo aŭ regiono de la tuta mondo pri scienca ludilo tre interesa. Sin turni al « Deka M. », 7, strato Ambroise-Paré, Paris.

7. — Oni petas makleristojn pri alkoholaĵoj en Belgujo. Sin turni al la Redakcio, n° 7.

8. — Makleristoj pri vinoj estas petataj ĉiulandaj. Sin turni al la Redakcio, n° 8.

9. — Oni petas Esperantiston por traduki esperante francajn tekstojn. Vidu la Direktoron, de la 18-a ĝis la 19-a, 7, Boulevard Rochechouart.

10. — Oleoj. — Pligrandigu viajn profitojn vendante al ĉiuj (parencoj, amikoj, k. t. p.) bonegajn kaj fame konatajn francajn oleojn de la firmo « Reynaud-Plense », Salon (Francujo).

11. — Spicistoj Makleristoj. — S-ro Ch. Tessez, 7, boulevard Rochechouart, Paris, petas makleristojn, kiuj jam vizitas la spicistaron.

12. — Vinoj. — S-ro G. Lemaire, villa « Les Ardennes », Villiers-sur-Marne (Francujo), deziras makleristojn ĉie.

## Petoj de Oficoj

1. — Samideano petas oficon pri maklero en Paris. Sin turni al la Redakcio, n° 1001.

2. — Samideano, havante oficistajn agentojn kun spicista klientaro, petas, ke la esperantaj industriistoj bonvolu konfidi al li sian prezaron.
Sin turni al la Redakcio, n° 1002.

3. — Ni havas oficejon en la centro de Paris. Se ia esperanta firmo deziras komisii nin pri specimenoj kaj prezaroj, ni povas mendojn ricevi de niaj klientoj.

Ni petos nur sumeton jare.

Ĉirkaŭ 1000 personoj — neesperantistaj — vizitas nian magazenon semajne.

Sin turni al la Redakcio, n° 1003.

4. — Samideano gvidas tra Paris la alilandajn samideanojn, kiuj venas en tiun urbon.

Sin turni al la Redakcio, n° 1004.

5. — Oni petas parismonopolan reprezentadon, prefere de esperantista firmo. Sin turni al la Redakcio, n° 1005.

6. — Samideano serĉas oficon de kasisto, de librotenisto, oficisto, k. t. p. en parisa firmo.

Ni konas tiun amikon kaj ni povas rekomendi speciale lin. Bonvolu skribi al S-ro H. Serres, 10, strato Lecourbe, Paris.

## Proponoj kaj petoj de Prezaroj

1. — Oni petas esperantajn ĉiuspecajn prezarojn. Sendu al la Redakcio de « E. R. K. I. »

2. — Ni petas ĉiujn esperantistajn komercistojn kaj industriistojn, ke ili bonvolu komisii al nia presisto la presadon de siaj esperantistaj aŭ ne prezaroj. La speciala presisto de « Esperanta Revuo pri Komerco, Industrio » povas bonfari ĉiuspecajn presaĵojn.

Moderaj prezoj. — Rapida liverado.

3. — « L'Entr'aide Catholique » sendas al ĉiuj sian prezaron. La vendotaj produktaĵoj estas famaj tra la katolikaro.

4. — La Industriistoj devas peti al S-ro Lud. Marchier, 6, rue du Repos, en Paris, unu skatolon da « Coco de Calabre », kun kiu oni povas fari cent litrojn da bonega, digestiva, senalkohola kaj refreŝiga trinkaĵo.

Li sendas la skatolon po o Sm. 500 afrankite ; 100 skatolojn, 30 Sm.

La « Coco de Calabre » estas uzita ĉie.

5. — Oni petas prezarojn, eĉ neesperantajn, de ĉiuj nutraĵoj. Sendu al la Redakcio de « E. R. K. I. ».

## INTERŜANĜO

1. — S-ro Karl Barwig, Berlin O. 112, komercisto, Weichsalstr. 17, interŝanĝas vidaĵkartojn.

2. — S-ro Ch. Tessez, 7, boulevard Rochechouart, Paris, interŝanĝas poŝtmarkojn kaj ilustritajn poŝtkartojn.

## DIVERSAĴOJ

1. — La artistuloj, kiuj povas uzi Esperanton, devas sendi sian adreson al « Teatrulo », Redakcio de E. R. K. I.

2. — Ni havas grandan salonon. Oni povas ĝin lui. La prezo estas modera. Vidu nin de la 18-a ĝis la 19-a.

## BIBLIOGRAFIO

*La eldonantoj, kiuj deziras, ke ni raportu pri iliaj eldonaĵoj, estas petataj ĉiam sendi donace al la Redakcio po du ekzempleroj de ĉiu verko.*

**Raporto pri la Naŭa Kongreso de Esperantistoj** (Bern 1913), de Ned Katryn. (Eltirita el « Lingvo Internacia ».) 94 paĝoj, 14 × 21. — Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris. Prezo : 1 fr. (0 Sm. 400).

**Esperanto.** Cours complet, par Théophile Cart, Mme Servin et Em. Robert. 4-a eldono. 136 p. 12,5 × 19,5. — Paris, Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris. Prezo : 1 fr. 25 (0 Sm. 500).

**La vojo de l' vivo,** ĉapitro XXII. *La vorto,* de L. N. Tolstoj, tradukis Paŭlo Medem. 16 p. 12,5 × 18. — Kovno (Ruslando), eldono de la Kovna Esperantista Societo. Prezo : 10 sd.

**Oficiala kongresa poŝtkarto,** po 10 centimoj ; dekduo 1 fr. — Glumarkoj, 1 fr. la cento. — Aĉeteblaj ĉe Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

# DEKA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

**PARIS — 2-10 Aŭgusto 1914 — PARIS**

3, place Jussieu, Paris

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

*Mi subskribint(in)o deziras aliĝi al la* ***DEKA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO*** *kaj por tio mi pagas la sekvantajn kotizojn :*

*1 Kongresa Karto* . . . . . . . . . . . . . . . . . *Fr.* **15.—**

........ *Suplementa(j) Karto(j) po Fr.* **10** . . . . . . *Fr.* ........

*Mi sendas ĉi-kune per* .................... *la sumon de Fr.* ........

*al la* **DEKA KONGRESO DE ESPERANTO**
**3, place Jussieu, Paris**

*Familia nomo* (1) *(S-ro, S-ino, F-ino)* ....................

*Persona antaŭ- aŭ bapt-nomo* (2) ....................

*Profesio* (2) ....................

*Nacieco* (2) ....................

*Strato kaj numero* (1) ....................

*Urbo* (1) ....................

*Provinco* (1) .................... *Lando* (2) ....................

*Kune venas familianoj, kies nomoj estas :*

*(S-ro, S-ino, F-ino)* ....................

*(S-ro, S-ino, F-ino)* ....................

*(S-ro, S-ino, F-ino)* ....................

*Dato :* ....................    *Subskribo :* ....................

---

(1) En nacia lingvo.
(2) En Esperanto.

## Deka Universala Kongreso de Esperanto

**(Paris, 2.-10. Aŭgusto 1914.)**

*Pri la Kongresa Gazeto.* — Kelkaj samideanoj demandis la Organizan Komitaton de la Deka, kial ĝi ne sendas al la kongresanoj, kiuj aliĝos inter Januaro kaj Aŭgusto, la jam aperintajn numerojn de la Kongresa Gazeto. Nu, tute simple ĉar tio ne estas ebla. Por tion fari, ni devus scii, kiom da Esperantistoj partoprenos en la Deka Kongreso, kaj antaŭpresigi sufiĉan nombron da ekzempleroj de la Kongresa Gazeto — sed pri tio ni absolute ne povas havi ideon. Kaj se ni presigus nombron da ekzempleroj certe pli ol sufiĉa — ekzemple 10.000 — ni farus senutile gravan elspezon.

Aliflanke oni devas konsideri, ke la kongresanoj, kiuj aliĝas frue, tre faciligas la gravegan laboron de la Organiza Komitato. Estas do tute juste, ke ili ricevu ian kompenson — nome plenajn kaj freŝajn informojn pri la Deka.

Sed, ĉar por la samideanoj, kiuj loĝas en landoj malproksimaj de Eŭropo, la templimo unue fiksita por la aliĝoj, kiuj rajtigos al la ricevo de la Januara Kongresa Gazeto, estus eble iom nesufiĉa, la Organiza Komitato decidis, ke la Esperantistoj, kies aliĝon ĝi ricevos en Januaro 1914, ankaŭ ricevos la unuan numeron de la Kongresa Gazeto. Poste oni aplikos la antaŭe fiksitan regulon, t. e. ke la kongresanoj, kiuj aliĝos en Februaro ricevos la Kongresan Gazeton de Marto, Aprilo, k. t. p., tiuj, kiuj aliĝos en Marto ricevos la numerojn de Aprilo, Majo, k. t. p.

*

* *

*Organizo de la laboro.* — Por metode labori, oni dividis la farotajn klopodojn. Flanke de la Organiza Komitato, S-roj Bricard, Chaussegros kaj Rollet de l'Isle, troviĝas ĝenerala sekretario, S-ro Warnier ; kasisto, S-ro Balliman ; arĥitekturisto, S-ro Agache.

Plie, jam kelkaj komisionoj funkcias. Estas komisionoj por la hoteloj kaj restoracioj ; por la teatroj (S-roj de Ménil kaj Pujulà) ; por la ekskursoj (S-ro Chilard) ; por la ekspozicio kaj vendejo (S-ro Rousseau) ; por stacidomoj ; por promenadoj (S-ro Rollet de l'Isle) ; por la gazetaro (S-ro Archdeacon) ; por la kongresgazeto (S-ro R.-Ch. Pichon).

*Alvojaĝado de la Kongresanoj.* — Oni nun faras ĉiajn klopodojn por havigi al la kongresanoj rabatan prezon sur la francaj fervojoj. Tre certe U. E. A. aranĝos karavanojn, kiel ĝi kutimas. Ĉe la landlimo dejoros helpantoj, kiuj peros inter la dogano kaj la kongresanoj kaj donos al ili ĉiajn informojn kaj eventuale la rabatilon. Ĉe ĉiu stacidomo en Paris estos instalita akceptejo kaj dejoros helpantoj. La helpantoj surportos specialan signon, ekzemple brakbanton kun stelo.

*Ekspozicio, Vendejo.* — Ili estos en malsamaj ĉambroj. La nura vendejo, jam tre granda per si mem, sed malgrandega kompare la tutan Palacon Gaumont, surkuŝas 400 m². Prezidanto de la speciala komisiono estas S-ro Rousseau, 4, place de la République, Levallois-Perret, Seine. Oni skribu al li !

*Afiŝo, poŝtkarto, marko.* — La poŝtkartoj kaj glumarkoj reproduktas la afiŝon, kiun verkis S-ro Agache. Ĝi montras, en sunsubira lumo, ekdormantan parton de Paris. Oni vidas maldekstre parton de la Eiffel'turo, centre riveron Seine, dekstre la arbojn de la bordo kaj

la du turojn de « Trocadéro ». La tuto liveras artan impreson. Presite : 5.000 afiŝoj, 50.000 poŝtkartoj, 100.000 glumarkoj.

La afiŝoj estas jam tute pretaj. Ili estos aĉeteblaj de la 15. de Januaro, kaj oni povas mendi ilin po fr. 1,50 (sendopago entenata !). Sed jam de nun oni vendas du apartajn seriojn por kolektantoj. Ĉiu ties ekzemplero estas numerita kaj subskribita de la verkinto, S-ro Agache.

Serio A (numerita de 1 ĝis 100) . . . . . po fr. 5
Serio B (numerita de 101 ĝis 105) . . . . po fr. 10

Noto. — La serio B ne entenas verdan koloron. Eble por Esperantistoj tio estas nebonaĵo, sed la tre malmultaj afiŝoj de tiu ĉi serio liveras tre pitoreskan efikon.

*Promenadoj.* — Ĉiutage, eble du fojojn en la tago, okazos piedaj promenadoj tra la urbo, per gvidado de kompetenta Esperantisto. Verŝajne la vidindaĵoj estos dividitajen 5 aŭ 6 promenadoj, kiuj estos ĉiutage ripetataj kaj daŭros 1 ½ - 2 horojn.

(Laŭ *Kongresa Gazeto*.)


**COCO de Calabre**

**Bonega, digestiva, malkara TRINKAĴO**

Po 0 Sm. 500, oni ricevas skatolon, kun kiu oni povas fari 100 litrojn.

Sin turni al :

**S-ro Ludovic MARCHIER**

**6, Rue du Repos, 6**

PARIS.

Telefono : Roq. 63-23.

**SE VI ŜATAS**

**bonajn francajn OLEOJN**

provu la faman markon

**Reynaud-Plense**

**Salon**

(Francujo).

Specialfako de olivoleoj kaj manĝoleoj por hejmaj provizaĵoj.

**Petu la tarifon.**

*Rabato al Esperantistoj.*

MAKLERISTOJ PETATAJ.

***Oni korespondas Esperante.***

**Esperantistoj !**

*Trinku la digestivan LIKVORON*

**COURTISANE**

Sin turni al S-ro **A. CHETAIL,** en COURS (Rhône), — aŭ al :

**Union des Intérêts Commerciaux et Industriels,**

34, Rue Taitbout, Paris.

# ABONKONDIĈOJ

La abonantoj povas sendi la pagon de sia abono per poŝtmandato, ĉekbanko aŭ respondkuponoj.

Ili povas enpresigi senpage kvin liniojn tra la sekvantaj rubrikoj : Petoj aŭ proponoj de oficoj ; -- Petoj aŭ proponoj de prezaroj ; -- Interŝanĝo ; -- Diversaĵoj, k. t. p.

Ni petas niajn abonantojn, ke ili bonvolu sendi al ni la abonbultenon, kiu ekzistas sur tiu paĝo, plenuminte ĝin, aŭ ke ili bonvolu sendi al ni ĉiujn enhavatajn sciigojn.

## PREMIOJ AL NIAJ ABONANTOJ

Po 0 Sm. 500 (sendelspezo) ĉiu jarabonanto ricevos, afrankite, belan kaj bonan premion : paketon enhavantan kelkajn necesaĵojn pri la vivado.

---

# ABONBULTENO

Mi ..................................................

Profesio ..................................................

Adreso ..................................................

deziras jarabonon de *« Esperanta Revuo pri Komerco kaj Industrio ».*

Bonvolu trovi kune du spesmilojn per .................. (1)

Mi sendas ankaŭ 0 Sm. 500, sendelspezon de la premio (2).

Bonvolu enpresi en « E. R. K. I. » la kvin sekvantajn liniojn :

..................................................

..................................................

..................................................

..................................................

..................................................

(1) Poŝtmandato — ĉekbanko aŭ respondkuponoj.

(2) Nur se vi deziras ricevi la premion.

*AĈETU*

LA BONEGAN

Densigitan Buljonon

« **FOX** »

Petu la prezaron al :

**Union des Intérêts Commerciaux & Industriels**

**34, rue Taitbout, 34**

**PARIS**

**Katolikaj Pastroj !**

Petu la tarifon al

**« Entr'aide Catholique des Œuvres »**

**27, rue de la Chaussée-d'Antin, 27**

*PARIS*

Oni vendas la produktaĵojn de Katolikaj Francaj Pastroj.

*Mielo, Vinoj, Likvoroj, Konservaĵoj, k. t. p.*

Bonaj VINOJ

**Firmo**

**PUILLET kaj K°**

**BORDEAUX**

**(Francujo)**

Petu la tarifon.

**UNION DES INTÉRÊTS Commerciaux & Industriels**

34, RUE TAITBOUT, 34

PARIS

petas en ĉiu urbo reprezentanton por vendi al la komercistoj siajn artikolojn.

**Oni vendas nur bonegajn produktaĵojn.**

Grandaj profitoj por la agentoj.

Le gérant : Ch. TESSEZ.

Imprimerie Espérantiste V. Polgar, 33, rue Lacépède, Paris.

Mi sendos afrankite per poŝtpaketo unu belan skatolon lado je 5 kilogramoj de OLIVOLEO, delikata kvalito, je la sekvantaj kostoj :

Por lokoj en :

Hispanujo . . . . . . 13 pesetoj
Francl. kaj Portugal. 12 fr. 50
Germanujo, Belgujo, Svisujo, Italujo kaj Alĝerio . . . . . . . 13 frankoj
Aŭstrujo-Hungarujo, Creto, Danujo, Maroko, Holando kaj Egiptujo . . . . . . 13 fr. 50

La kosto devas esti sendata poŝtmandate, respondkupone, papermone aŭ ĉekbanke.
Nenia mendo estos plenumita antaŭ ol oni sendos la pagon.

Vidvino J. Navarro-Cardona
**TORTOSO (Hispanujo).**

SE VI DEZIRAS
aĉeti ian libron
presigi ian tekston
aĉeti ian aĵon
Skribu al :
**KOMERCAGENTO**
de « Esperanta Revuo pri K. I. »
27, rue de la Chaussée-d'Antin
PARIS

SE VI DEZIRAS
Agenton en PARIS
SE VI VOLAS
komerci tra Francujo
Skribu rapide al :
Union des Intérêts Commerciaux et Industriels
34, rue Taitbout, Paris.

REZERVITA
por la firmo
P. M. GRUNWALDT
Felisto
6, Rue de la Paix, 6,
PARIS

# La SKRIBMAŜINO "JAPY"

estas la plej bona, forta, rapida, preciza, facila
la malplej kara, kaj fine per ĝi

**ONI POVAS RAPIDE ESPERANTON SKRIBI**

Sin turni por sciigoj al la firmo :

**Japy Fratoj & K°, en Beaucourt (Francujo)**


aŭ :

**7, Rue du Château-d'Eau, PARIS.**

---

# Holden Fratoj

liveras Botojn, ŝuojn, Sandalojn, Pantoflojn, Kaŭĉukajn ŝuojn, Ŝtrumpojn kaj Ŝtrumpetojn. Ĉiuj ekskluzive laŭ la tipo « Naturformo »




## Holden Fratoj

**3, Harewood Place, Oxford Circus, LONDON W.**

*Katalogoj senpage. — Oni parolas Esperante.*

---



# NOVA

estas bonega **POŜBRULIGILO**

Specimeno je alsendo de respondkupono.

## Georg REINER

**Berlin-Rummelsburg, C.**

---

Centra Presejo Esperantista, V. Polgar, 33, rue Lacépède, Paris.